



Ĉina Internacia Festivalo de

Mallongaj Filmoj, 2016-2017

Internacia Konkursito de Mallongaj Filmoj

## Teo kaj Amo

Kiel nia lingvo Esperanto, teo povas roli kiel perilo por amo. Bonvolu rakonti per filmeto pri teo kaj amo, vi havos ŝancon **senpage vojaĝi al Ĉinio**.

Foje diris Julio Baghy: *“Amo kreas pacon, paco konservas humanecon, kaj humaneco estas la plej alta idealismo.”* Amo estas la kerno de nia lingvo Esperanto. Kaj Teo, kiun trinkas ĉiutage du trionoj de la monda loĝantaro, estas la magia trinkaĵo, kiu vekas energion kaj iniciatas la vivmanieron de paco kaj amo. Tion celas ankaŭ nia lingvo Esperanto.

Do aliĝu! Rakontu pri teo kaj amo per mallongaj filmoj! Ni estas pretaj gastigi vin en Ĉinio!

**Subtemo - decidata de vi!!!**

La temo estas “Teo kaj Amo”. **“Amo” estas ne nur la profundaj rilatoj inter viro kaj virino, sed ankaŭ pli ampleksa kaj pli granda, ekzemple amo de gepatroj, amo inter gefratoj, amo inter amikoj, amo al la naturo, amo al paco, amo al legado, vojaĝo, Esperanto,**

**literaturo, sporto... estas bonvenaj ĉiuj subtemoj.**

**“Teo kaj Amo” estas la ĉiama titolo de nia filmkonkurso kaj filmfestivalo, kiel Oscar-filmfestivalo kaj Cannes-filmfestivalo.**

### **Celo**

Sub aŭspicio de UEA, la konkurson organizas Ĉina Radio Internacia kaj Hangzhou-a registaro, celante:

**A)** evoluigi la arton de mallonga filmo en la internacia lingvo kaj premii la partoprenantojn, kiuj elstariĝis pro sia kontribuo al la arto de mallonga filmo, kaj riĉigi esperantajn kulturojn.

**B)** montri al la publiko, ke Esperanto estas viva, utila, vigla kaj ekspluatinda.

**C)** atentigi ne-esperantistajn rondojn, allogi novajn “esperantistojn”, precipe junulojn, igi asociojn kaj klubojn de Esperanto komunikiĝi kun lokaj radioj, televido, ĵurnaloj kaj aliaj ne-esperantistaj rondoj, kaj aktivigi individuojn kaj asociojn de Esperantujo.

**D)** Provi merkatigi Esperanton (La konkurson monsubtenas ĉinaj te-entreprenoj, te-societoj kaj lokaj registaroj)

La **Regularo** kaj la **Aliĝilo** troviĝas sube kaj en la jenaj ligiloj:

<http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/> (*esperante*)

<http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016c/> (*ĉine*)

### ### Regularo ###

#### Tagordo

| Programo/Monato     | De Majo ĝis Novembro, 2016 (7 monatoj) |  |  | Januaro, 2017 | Februaro, 2017 | Marto, 2017 | Aprilo, 2017 |
|---------------------|--|--|--|---------------|----------------|-------------|--------------|
| Filmo-kolektado     | ■                                      |  |  |               |                |             |              |
| Aljuĝo de ĵurio     |  |  |  | ■             |                |             |              |
| Interreta Voĉdonado |  |  |  | ■             |                |             |              |
| Filmfestivalo       |  |  |  |               |                |             | ■            |

#### Partopreno

##### - Partoprenos ĉiuj!

Profesiaj kaj amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, amaskomunikilistoj, studentoj kaj kreemaj homoj el la tuta mondo. Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ ne-esperantistoj!

-La aliĝo al la konkurso estas **senpaga**.

-Limdato por sendi filmojn estas la **30a de novembro 2016**.

-Ĉiu filmo devas **havi elementon "teo"**.

-Ĉiu filmo estu **minimume 2 kaj maksimume 15** minutojn longa.

- La filmo estu en la formato **MPG, MPEG-4, WMV, AVI, MP4, MOV, 1920x1080, 16:9, 25p**

-Estas permesitaj desegnaj, muzikaj, dokumentaj, teatraj filmoj kaj aliaj.

-Uzeblas iu ajn aparato por filmado, ekz. poŝtelefono, filmkamerao kaj similaj.

-Ĉiu lingvo de la mondo povas esti uzata.

-Filmfarantoj **mem aldonu subtitolojn esperantajn**. Se li/ŝi ne estas esperantisto, do **aldonu subtitolojn nacilingvajn**. La subtitoloj devas inkludi komencon kaj finon de la filmeto, ankaŭ nomojn de filmfarantoj. Samtempe konservu **sensubtitolan** version de la filmo.

- Filmfarantoj faru **bonkvalitan afiŝobildon** de la filmeto, **57cm x 84cm (larĝo x alto)**, la formato estu **JPG kaj PDF**.

- Filmfarantoj skribu **vivresumon** (ĉirkaŭ 250 vortoj) kaj preparu almenaŭ **2 personajn/grupajn fotojn**, unu estu horizontala (3264 px x 2488 px) kaj la alia vertikala (2488px x 3264 px), ĉiu foto pezu almenaŭ 2M.

- Ĉiu partoprenanto (persono aŭ teamo) rajtas sendi pli ol unu konkursaĵo;  
Ĉiu konkursaĵo rajtas gajni plurajn el la premioj;

- Ĉiu konkursaĵo rajtas partopreni en aliaj konkursoj

La konkursaĵoj, kiuj partoprenis en la unua konkurso “Teo kaj Amo” (2014-2015), ne rajtas partopreni en la dua kaj eventuale pluaj;

Plenigu la aliĝilon (sube), subskribu nomon kaj daton fine de “**Rajtigo**”

① **Aliĝilo**

② **filmeto kun subtitolo en Esperanto aŭ en nacia lingvo (por ne-esperantistoj)**

③ **filmeto sen subtitolo**

④ **WORD-formato de subtitolo en esperanto aŭ en nacia lingvo**

⑤ **afiŝobildo**

⑥ **vivresumo kaj almenaŭ 2 personaj/grupaj fotoj**

estu senditaj per interreta servilo, kiel **Dropbox, Google Drive, OneDrive, Bitcasa, SkyDrive** aŭ iu simila, al:

**[filmkonkurso2015@163.com](mailto:filmkonkurso2015@163.com)**

- La partopreno en la konkurso signifas komprenon kaj akcepton de ĉiuj punktoj de ĉi tiu regularo.

- Demandoj, rilataj al la konkurso, estu senditaj al

**organizanto en Ĉinio:**

A) la retpoŝtadreso **[filmkonkurso2015@163.com](mailto:filmkonkurso2015@163.com)**

**Ĝoja [perfectgoja@163.com](mailto:perfectgoja@163.com)**

**Shanshan [48045737@qq.com](mailto:48045737@qq.com)**

**Pluveta [zhangpingxiaoyu@163.com](mailto:zhangpingxiaoyu@163.com)**

B) telefono **0086-10-68891795**

C) adreso **ESPERANTO SERVICE, CRI-36**

**CHINA RADIO INTERNATIONAL**

**P. O. Box 4216, BEIJING**

**P. R. CHINA 100040**

### **Rajtigo**

- La kopirajto pri la muziko por publika uzo devas esti certigita.
- La personoj en la filmo permesis ĝian uzon por publika prezento.
- La filmfaranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniu rajto de aliaj personoj estas lezita.
- Post la konkurso la filmoj estos libere prezentablaj por ĉiuj sub la “Creative-Commons-Licence (CC-BY)”.

### **Juĝo**

**Juĝo konsistas el Aljuĝo de ĵurio kaj Interreta Voĉdonado.**

**Aljuĝo de ĵurio**: Naskiĝo de premioj jenaj:

- A) **Plej bona filmo**
- B) **Plej bona scenaristo**
- C) **Plej bona reĝisoro**
- D) **Plej bona desegnofilmo**
- E) **Plej bona originala muziko**
- F) **Plej bona ĉefaktoro**
- G) **Plej bona ĉefaktorino**
- H) **Plej bona kameraisto**

I) **Plej bona muntisto**

J) **Speciala(j) premio(j) (la premio(j) dependos de la estontaj konkursaĵoj)**

Finan juĝadon respondecas la ĵurio, konsistanta el **estrarano(j) de UEA**, kaj fakuloj el kampoj de tekulturo kaj filmfarado en Ĉinio.

**Interreta Voĉdonado:** 10 Premioj de la publiko

Por la **premio de publiko**, la publiko voĉdonos por sia plej ŝatata filmo en la retejo <http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/> (esperante) <http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016c/> (ĉine), sen difinita kriterio.

La voĉdonado daŭros de januaro ĝis marto, 2017.

Jura traktado de la rezulto ne eblas. Se Ĉina Radio Internacia ne ricevos sufiĉe multajn filmetojn, ĝi rezervas al si la rajton nuligi iu(j)n premio(j)n.

## **Premioj**

- **Premio de A ĝis J:** 10 reprezentantoj de la 10 premiotaj filmoj **senpage**

**5-tage vojaĝos en Ĉinio** kaj partoprenos en

Esperanto-Filmfestivalo, kiu okazos aprile 2017.

**Ni pagos veturkoston, loĝadon kaj manĝadon de la 10 personoj, kiuj reprezentas la filmfarantojn de la 10 premiotaj filmoj dum la festivalo.**

- **Dek premioj de la publiko:** Atestilo kaj premi-donaco

-Anonco de la rezulto de la konkurso okazos en Esperanto-Filmfestivalo.

- La rezulto de la konkurso estos publikigita ankaŭ en la retejo de ĈRI

**Tie ĉi troviĝas “Teo kaj Amo”, al kiu vi estas bonvena !!**

<http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016/> (esperante)

<http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016c/> (ĉine)

FB <https://www.facebook.com/groups/817633741655742/>

VK [https://vk.com/teo\\_kaj\\_amo](https://vk.com/teo_kaj_amo)

WECHAT teafilm



TWITTER [https://twitter.com/Teo\\_kaj\\_Amo](https://twitter.com/Teo_kaj_Amo)

YOUTUBE

<https://www.youtube.com/channel/UCAv49qgR311eI5SY6pY7azA/videos>

PODCAST

<https://itunes.apple.com/cn/podcast/teo-kaj-amo/id956714804?mt=2>

**Rimarkigo:**

**Esperantistoj estas invitataj traduki tiun ĉi dokumenton al aliaj lingvoj.**

**– Dankon.**



### ### Aliĝilo ###

|  |   |
|--|---|
| <b>Titolo de la konkursaĵo</b>         |   |
| <b>Lingvo(j) en la konkursaĵo</b>      |   |
| <b>Reta ligilo por elŝuti filmeton</b> |   |
| <b>Resumo de la konkursaĵo</b>         |   |
| <b>Ĉefaj laborantoj</b>                | <b>Reĝisoro(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
|  | <b>scenaristo(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
|  | <b>desegnisto(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
|  | <b>muzikisto (j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
|  | <b>aktoro(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
|  | <b>muntisto(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
|  | <b>fotisto(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>  |
|  | <b>alia(j)</b> <b>lando(j)</b> <b>profesio(j)</b>   |
| <b>Rajtigo</b>                         | <p>Mi garantias, ke la konkursaĵo estas originala, ke mi havas ĉiujn rajtojn por la konkursaĵo kaj ke ĉiuj informoj donitaj estas veraj.</p> <p>Mi garantias, ke</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- La kopirajto pri la muziko por publika uzo estas certigita.</li> <li>- La personoj en la filmo permesis ĝian uzon por publika prezento.</li> <li>- La filmfaranto garantias, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke neniu rajto de aliaj personoj estas lezita.</li> <li>- Post la konkurso la filmoj estos libere prezentebaj por ĉiuj sub la “Creative-Commons-Licence (CC-BY)”.</li> </ul> <p style="text-align: right;">Subskribo: _____</p> <p style="text-align: right;">Dato: _____</p> |
| <b>Kontaktanto(j)</b>                  | <b>Nomo(j)</b><br><b>Ret-adreso(j)</b><br><b>Telefono(j)</b><br><b>Poŝtadreso(j)</b>  |

## **SALUTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

Nome de Universala Esperanto-Asocio, mi elkore gratulas al Ĉina Radio Internacia pro ĉi tiu unika kaj valora konkurso, okazanta jam la duan fojon. Filmo kaj video fariĝis pli gravaj ol iam ajn antaŭe, kiel rimedoj por kunligi homojn en la tuta mondo. Ne plu estas tiel, ke nur profesiuloj kun granda buĝeto povas produkti kaj disvastigi siajn kreaĵojn.

Nun filmo fariĝis tre demokratia, malmultekosta kaj fleksebla rimedo, per kiu eblas ŝerci kaj seriozi, festi kaj protesti, per kiu eblas ekhavi pli veran bildon pri la ĉiutagaj zorgoj, espero kaj streboj de niaj kunhomoj ĉie tra la mondo.

Tiuj estas ankaŭ la celoj de Esperanto, lingvo malmultekosta, fleksebla kaj potenca, per kiu eblas kunligi homojn en la tuta mondo por tutplaneda komunikado. Tial Universala Esperanto-Asocio volonte subtenas ĉi tiun konkurson kaj kunlaboras por ties sukcesigo.

Mi deziras al la organizantoj prosperan antaŭeniron kaj bonajn reeĥojn kaj rezultojn el la tuta mondo.

Mark Fettes

Prez. de Universala Esperanto-Asocio

## Internacia Konkurso de Mallongaj Filmoj

# Teo kaj Amo

Aprile de 2014 komenciĝis la konkurso “Teo kaj Amo”. Ĝi daŭris unu jaron kaj finiĝis aprile de 2015. Kun la aŭspicio de UEA, la konkurson ĉefe organizis Ĉina Radio Internacia, Zhejiang-a Agrikultura kaj Forstokultura Universitato kaj Hangzhou-a Asocio por Popularigi Te-Markon, kaj sponsoris Ĉina Ligo de Tetrinkejoj. La konkurso gajnis bonan rezulton kaj bonan internacian eĥon.

Venis 45 filmetoj (rekordaj) dokumentaj, rakontaj, muzikaj kaj bildaj kun la stiloj komedia, trista, parola kaj senparola. La filmetoj priskribis morojn kaj kulturojn de teo en Ĉinio, Irano, Sud-Koreio, Turkio kaj Rusio, rakontis historiojn de Kolombio, Sud-Koreio, Ĉinio kaj Rusio, montris ekzotecon de diversaj landoj kaj bilde kaj videe eksplikis la eternajn temojn - AMO kaj PACO.

Aprile 2015 en la ĉina urbo Hangzhou en la filmfestivalo “Teo kaj Amo” partoprenis 29 premiitoj el la 15 landoj, kaj ili spertis ĉinan kulturon, te-kampan vivon, eĉ amikiĝis kun ĉinaj ordinaraj personoj.

Pro la sukceso, aprile 2016, rekomenciĝis la dua konkurso “Teo kaj Amo”. Do, bonvolu ĝui la konkurson, prezenti vian talenton, gajni la ŝancon senpage vojaĝi al Ĉinio kaj sperti ekzotan etoson en la orienta lando.